Jaro IV/VIII. N-o 3 (39) Decembro 1926

Sennacieca Revuo

Monata Organo
de Sennacieca Asocio Tutmonda
FONDITA EN 1919

LITERATURO — SCIENCO — PEDAGOGIO

ENHAVO:

Reĝo Kapital'! Trad. *H. Pek.* — *L. Ivn:* Malnova fabelo laŭ nova modelo. — *N. V. Nekrasov:* Siberia lulkanto (2). — *E. Spiridoviĉ:* La skemo de lingva evoluo (1). — *K. Fröding:* Kondutismo. — *D-ro A. Fiŝer:* Iom pri vitaminoj. — *M. Starr:* Ŝovinismo en la Brita Lernejo.

Redakcio: 1-a Tverskaja-Jamskaja, 35, kv. 5, Moskvo 1 (USSR)
Administracio: Rich. Lerchner, Colmstrasse 1, Leipzig O 27 (Germ.)

REDAKCIA ANGULO

Cies nia deziro estas — ke vivu daŭre kaj kresku nia revuo, la sola literatur-scienca gazeto de esperantistoj. En la antaŭa numero ni skizis la vojon, per kiu ni povas pliriĉigi la enhavon de la revuo, pliampleksigi ĝin. Sed minacas per lancoj, avertas nin la "financministro" de SAT: pli singarde ni rilatu al tiu afero kaj ne kaŭzigu al SAT deficiton per pliampleksigo de la revuo.

Konante la bataleman spiriton de niaj SAT-K-doj, ni kuraĝas deklari militon al nia "financministro" (certe ne la voĉdonon pri malaprobo — tio estas ja nur parlamentaĉa kutimo). Ni vokas ĉiujn K-dojn al tuja militiro kontraŭ li.

Jen estas nia

militplano:

Moderna milito komencas per *kemia preparo por ĝenerala atako.*

Ĝi celas senfortigi la kontraŭulon antaŭ la decida ofensivo kontraŭ li. Tiucele ni elektis *sendormigan gason,* tre facile realigeblan jenmaniere: ni tuj komencu varbi abonantojn al nia revuo kaj superŝutu nian "financministron" kaj administranton per tia pluvego de abonoj, ke registrante ilin, li tute ne havu tempon por dormi. Kompreneble ĉiu abono estu akompanata per monbileto, por ke kalkulado de la lastaj forprenu de li la lastan eblon kaj tempon por dormi. Varbado estas nun multe pli facila ol antaŭe — necesas nur montri unu kajeron de la revuo kaj klarigi ke tian multenhavan kaj belan revuon SAT-anoj povas aboni nur kontraŭ mk. g. 2.50 (vidu la abontabelon).

Kvankam tia kemia preparo, laŭ nia opinio, per si mem estus sufiĉa por venki nian "financministron" (malgraŭ lia korpulenteco — vidu la kinofilmon de la VI-a kongreso kaj du reproduktaĵojn el ĝi en N-o 113 de "Sennaciulo"), ni tamen, por definitive certigi la venkon, proponas:

ĝeneralan atakon

kontraŭ la financministro per donacoj al Jubileo-ĉeno de SAT kaj per mendoj de SAT-akcioj.

Longaj rilatoj niaj kun la financministro kaj specialaj esploroj, entreprenitaj de ni, konvinkas nin ke nur tiu militplano povas garantii al ni venkon kaj pliampleksigon de la revuo.

Ni esperas, ke tre baldaŭ post apero de tiu ĉi kajero la financministro estos devigita deklari sin venkita, ĉar certe vi komencos efektivigi ĉi supran planon sen ajna prokrasto. *La Redakcio.*

REĜO KAPITAL'!

La jutfabriko ne plenumis sian promeson plialtigi mian salajron tage por unu kaj duono da dolaroj kaj mi, libera Amerikano, kies antaŭuloj en ĉiuj militoj de post la Indianaj bataloj luktis antaŭ la revolucio, mi memoris pri mia sendependeco kaj iris.

Mi ankoraŭ estis decida resti en mia urbo kaj serĉis ĉi-tie alian laboron. Unu afero estis evidenta: nur metiista laboro valoris ion. Mi devis lerni ian metion kaj elektis elektroteknikon. La bezono por elektristoj kreskis ĉiam pli kaj pli. Sed kiel mi povus fariĝi elektristo? Mi ne havis monon por viziti Teknikejon aŭ la Universitaton; krom tio mi ne havis grandan fidon al la lernejoj, mi estis viro de praktiko. Mi ankoraŭ kredis al la malnovaj mitoj (fabeloj), kiuj, kiam mi estis knabo, cirkulis en la kapo de ĉiu amerikana knabo.

Ĉiu stratbubo povis fariĝi prezidanto. Ĉiu knabo, kiu trovis okupon en ia firmao, povis kun diligenteco, energio kaj sobreco supreniri de ŝtupo al ŝtupo kaj finfine fariĝi juniorĉefo de la firmao. Tiam estis nur la demando de l' tempo por fariĝi seniorĉefo. Tre ofte — tiel diris la mito — li ricevis kiel rekompencon por sia diligenteco la filinon de la ĉefo kiel edzinon. Mi en tiu tempo nun akiris tiom da memkonfido koncerne la interrilatojn kun knabinoj, ke mi estis tute certa ricevi la filinon de mia ĉefo. Tio estis tute certa. Ĉiuj knaboj en la mito faris tiel, kiam ili atingis la necesan aĝon.

Tial mi por ĉiam adiaŭis mian aventuristan emon kaj iris al la centralo de unu de niaj Oakland-aj tramoj. Mi trovis la ĉefinĝenieron mem en eleganta privatskribejo kaj estis blindigita tute, sed mi parolis rekte kaj libere el mia koro. Mi diris, ke mi volonte fariĝus elektroteknikisto, ke mi ne timas la laboron kaj ke li nur bezonas rigardi min por ekscii, ke mi estas forta kaj sana. Mi diris, ke mi volus komenci de komenco, ke mi volus superlabori min kaj dediĉi mian tutan vivon al tiu ĉi sola okupo kaj profesio.

La ĉefinĝeniero brilis aŭskultante min. Li diris, ke mi estas farita el la ĝusta materio por atingi ion kaj ke li kredas al la amerikana junularo, kiu volas antaŭeniĝi. Jes, la estroj ĉiam serĉas junajn homojn, kiel mi estas, kaj trovas ilin nur tro malofte. Mia ambicio estas bela kaj laŭdinda kaj li volas zorgi, ke mi havu eblecon por supreniro. Kaj kiam mi aŭskultis kun batanta koro, mi pensis, ĉu mi edziniĝus lian filinon.

— Sed antaŭ ol vi laboros sur la vojo kaj lernos la pli komplikitajn kaj gravajn detalojn de la metio, — diris li: — Vi kompreneble laboros en la remizo ĉe la instalado kaj riparado de motoroj.

Nun mi estis certa ricevi lian filinon kaj pensis, kun kiom da mono li partoprenas en la kompanio.

Sed, — diris li: — kiel vi mem povas imagi, vi ne povas esti tuj helpanto ĉe la elektristoj en la remizo, tio venas poste. Vi devas komenci de malsupro. Via unua okupo en la remizo estos purigi, balai kaj lavi fenestrojn kaj se vi montris, ke vi povas fari tion, tiam vi povas helpi al la elektristoj.

Mi neniel povis kompreni, kiel purigado kaj lavado povas esti preparo por la elektroteknikista metio, sed mi sciis el libroj, ke ĉiuj knaboj komencis kun la plej modestaj laboroj kaj malgraŭ tio poste fariĝis posedantoj de tutaj koncernoj.

— Kiam mi komencu la laboron? — demandis mi, plena de fervoro komenci mian brilantan karieron.

— Ni ja ambaŭ konsentas, — diris la ĉefinĝeniero, — ke vi devas komenci de malsupro. Mi ne povas vin doni tuj en la remizon. Unue vi devas en la maŝinhalo labori kaj ŝmiri.

Mia kuraĝo falis iomete kaj por unu momento ŝajnis al mi, ke estas tre longa vojo ĝis la filino. Sed mi pripensis, ke mi fariĝus pli bona elektristo, se mi konatiĝus unue kun vapormaŝinoj. Mi estis konvinkita, ke kiel ŝmiranto en la granda maŝinhalo, mi nur malmulte perdos, kio nome koncernis la vaporon. Granda ĉielo! Mia kariero ŝajnis al mi pli brila kiel iam.

— Kiam mi venu? — demandis mi dankplene.

— Sed, — diris la ĉefinĝeniero: — vi ne tuj povas komenci en la maŝinhalo. Vi devas antaŭe prepariĝi je tio kaj kompreneble en la hejtejo. Tio estas klare al vi, ĉu ne? Vi komprenos, ke unue oni devas konatiĝi kun la karbo, ke tio bezonas preskaŭ sciencan studadon. Ĉu vi scias, kiom pezas ĉiu funto da karbo, kiun ni bruligas? Tiamaniere ni ekscias la valoron de karbo, kiun ni aĉetas. Ni konas la pasivojn de nia produktado ĝis unu cendo, kaj ekscias samtempe, kiuj hejtistoj pro stulteco aŭ malzorgemo eltiras tro malmulte el la bruligita karbo. — La ĉefinĝeniero brilis denove: — Vi vidas, kiel gravas ekscii tion pri la karbo kaj ju pli vi ekscios de tio, des pli bona laboristo vi fariĝos, pli valora por ni, pli valora por vi. Nu, ĉu vi estas preta komenci?

— Ĉiam, — mi diris konvinkita, — ju pli frue, des pli bone.

— Bonege, — li respondis: — venu morgaŭ je la sepa matene.

Li sendis min eksteren por informigi min pri miaj devoj. Oni diris al mi ankaŭ mian labortempon: dek horojn tage, inkluzive dimanĉojn kaj festtagojn kun unu libera tago dum monato, kaj monata salajro de tridek dolaroj. Mi ne estis tre entuziasmigita. Jam antaŭ jaroj mi ricevis en konservfabriko unu dolaron tage por dek horoj da laboro.

Sed la penso konsolis min, ke mi hodiaŭ, malgraŭ mia aĝo kaj forto, ne pli salajris, ĉar mi ne estis metiisto. Nun devis fariĝi alie, nun mi laboris por lerni profesion, mi laboris por kariero kaj feliĉo kaj por la filino de l' ĉefinĝeniero.

Kaj mi komencis ĉe la ĝusta fino — ĉe la komenco nome, tio estis pri kio temis. Mi portis al la hejtistoj la karbon, kiuj ĵetis ĝin en la fornojn, kie ilia energio transformiĝis en vaporon, la vaporon, kiu en la maŝinhalo denove estis transformata en elektron, per kiu la elektro-teknikistoj laboris. Tiu ĉi portado de l' karbo estis certe la vera komenco, se nur la ĉefinĝeniero ne havu ankoraŭ la ideon sendi min en la karbminejon, por tiamaniere klarigi al mi la laborprocedon. —

Labori! Mi laboris kun viroj, sed mi eksciis, ke mi ne havis imagon, kio estas laboro. Dek horojn! Por tag- kaj noktperiodo mi devis fosi karbon kaj kvankam mi mem dum tagmezo laboris, mi neniam finis antaŭ la oka vespere. Mi laboris dekdu ĝis dektri horojn tage kaj ne ricevis la superhorojn pagitajn kiel en la konservfabriko.

Mi jam ĉi tie povas klarigi la sekreton. Mi faris la laboron de du viroj. Antaŭ mi forta, matura laboristo havis la tag- kaj alia same forta laboristo la noktperiodon. Ili ricevis ambaŭ po kvardek dolaroj monate.

Sed tiam mi ankoraŭ ne sciis, ke mi anstataŭis du virojn. Neniu diris al mi, kontraŭe la ĉefinĝeniero malpermesis al ĉiu diri tion. Kiel esperplena mi estis la unuan tagon! Mi laboris per miaj tutaj fortoj, plenigis la feran ĉaron per karbo, kuris kun ĝi al la pesilo, pesis la tuton, veturigis ĝin en la hejtejon kaj ĵetis ĝin sur la ferajn platojn antaŭ la hejtistoj.

Labori! Mi laboris, pli ol la ambaŭ viroj, kiujn mi anstataŭis. Ili alveturigis nur la karbon kaj ĵetis ĝin sur la platoj. Sed kiam mi faris tion kun la tagkarbo, mi devis ankaŭ amasigi la karbon por la nokto apud la muro de la hejtejo. Nun la hejtejo estis nur malgranda. Ĝi estis konstruita nur por unu nokthejtisto. Mi devis pro tio la karbon por la nokto surtavoli pli kaj pli alten, kaj poste la tutan amason ĉirkaŭi per fortaj bretoj. Tute supre mi devis poste ankoraŭ per la fosilo la karbon orde suprenmeti.

Mi ŝvitegis, sed neniam ripozis, kvankam mi sentis min preskaŭ tute elĉerpita. Je la deka matene mi estis konsuminta tiom da mia forto, ke mi malsatiĝis kaj manĝis dikan pecon da buterpano, destinita kiel tagmanĝo. Mi englutis ĝin starante, nigra de karbpolvo, kun tre-mantaj genuoj. Je la dekunua mi tiamaniere estis manĝinta mian tutan tagmanĝon, sed ĉu gravis? Mi pensis, ke mi tiel estus kapabla labori dum tagmezo. Kaj tiam mi daŭrigis labori la tutan posttagmezon. Malheliĝis kaj mi laboris ĉe elektra lumo. La taghejtistoj iris kaj nokt-hejtistoj venis, mi laboris ankoraŭ.

Je la naŭa kaj duono mi lavis la plankon, malsata kaj ŝanceliĝanta, ŝanĝis la vestojn kaj trenis mian dolorantan korpon al la tramo. Estis

tri mejloj ĝis mia loĝejo kaj mi ricevis senpagan bileton, sed kun la kondiĉo, ke mi nur rajtis sidi, se aliaj, pagantaj pasaĝeroj ne bezonis la sidlokojn. Kiam mi sidiĝis sur ekstera benko, mi preĝis, ke neniu venu kaj postulu mian lokon. Sed la vagono pleniĝis, sur duona vojo supreniris virino kaj ne estis sidloko por ŝi. Mi provis ekstari, sed rimarkis je mia miro, ke mi ne povis. La malvarma vento, kiu alblovis min, rigidigis mian mortlacan korpon surloke. La sekvanta parto de l'veturado pasis tiel, ke mi streĉis miajn dolorantajn membrojn kaj muskolojn kaj stariĝis sur la malsupra ŝtupo. Kaj kiam la tramo haltis ĉe mia angulo kaj mi malsupreniris, mi estus preskaŭ falinta. Mi lamis tra la du stratoj ĝis mia domo kaj ŝanceliĝante venis en la kuirejon. Dum mia patrino preparis la vespermanĝon, mi ekmanĝis pecon da buterpano, sed antaŭ ol mi estis satmanĝinta aŭ la viando estis fritita, mi jam ekdormis. Vane mia patrino provis veki min por ke mi manĝu. Ĉar tio malsukcesis, ŝi kondukis min kun la patro en mian ĉambreton, kie mi mortsimile falis sur la liton. Ili senvestigis kaj kovris min. Venontan matenon venis la lukto kun la ekvekiĝo, mia tuta korpo doloris kaj, kio estis la plej malbona, miaj artikoj estis dike ŝvelintaj. Mi anstataŭis la perditan vespermanĝon per grandega matenmanĝo, kaj kiam mi ekiraĉis por atingi mian tramon, mi havis duoble pli grandan tagmanĝpaketon ĉe mi ol hieraŭ.

Labori! Provigu junan viron, kiu ĵus fariĝis dekokjara, anstataŭi plenkreskitajn karbfosistojn. Labori! Longe antaŭ tagmezo mi estis manĝinta la lastan peceton de mia provizo. Sed mi estis decida montri al ili, kion povas fari forta junulo, se li nur volas. La plej malbona estis, ke miaj artikoj pli kaj pli ŝveliĝis kaj finfine tute malfunkciis. Preskaŭ ĉiuj scias kiel doloras elartikigo. Tiam imagu kiel malfacile estis fosi karbon kaj veturigi la peze ŝarĝitan ŝovĉaron kun du elartikigitaj manoj.

Labori! Pli ol unufoje mi falis sur la karbon, kie neniu povis vidi min, kaj kriis pro kolero, ĉagreno, laceco kaj malespero. La dua tago estis la plej peza, kaj la sola rimedo elteni ĝin, kaj post dektrihora daŭra penado ankoraŭ transporti la lastajn noktkarbojn al la hejtejo estis, ke la taghejtisto bandaĝis miajn artikojn, ke ili kvazaŭ estis engipsigitaj. La bandaĝoj forprenis de miaj artikoj la premon, kiun ili ĝis nun devis elteni, kaj ili estis tiel solidaj, ke la ŝvelado ne plu povis pligrandiĝi.

Kaj tiamaniere mi daŭrigis la preparon por la elektroteknikista fako. Nokton post nokto mi hejmenlamis, ekdormis antaŭ ol esti manĝinta kaj estis senvestigita kaj enlitigita. Matenon post mateno mi forlasis kun ĉiam pli kaj pli gigantaj provizpakaĵoj en la poŝo la domon por iri labori.

Mi ne plu legis la biblioteklibrojn. Mi ne plu renkontiĝis kun la knabinoj; mi estis nenio plu ol laborsklavo. Mi laboris, manĝis, dormis kaj miaj sentoj estis tute indiferentigitaj. Ĉio estis kiel pezega sonĝo. Mi laboris ĉiun tagon inkluzive dimanĉo kaj nur en granda malproksimeco aperis mia libera tago je la fino de l'monato. Tiam mi volis resti dudekkvar horojn en la lito, dormi kaj ripozi.

La plej stranga, kion mi travivis en tiu ĉi afero, estis, ke mi nek drinkis, nek entute pensis je drinkado. Kaj mi sciis, ke viroj ĉe tre peza laboro preskaŭ ĉiam drinkas. Mi vidis tion tre ofte, kaj mem estis ofte farinta tiel antaŭe. Sed al mi neniam venis la penso, ke unu glaso da biero povus fari bonon al mi. Mi mencias tion por montri, ke mia konstitucio tute ne bezonis alkoholon. Kaj estas rimarkinde, ke poste, dum pasado de multaj jaroj, interrilatante kun Reĝo Alkohol', tamen disvolviĝis en mi la deziro.

Mi ofte rimarkis, ke la taghejtisto scivole ekrigardis min. Finfine li unutage alparolis min, sed mi antaŭe devis promesi al li, neniam ellaŭtigi vorteton. La ĉefinĝeniero estis malpermesinta lin diri al mi ion, kaj se li nun tamen faras ĝin, li riskas sian okupon. Li rakontis al mi pri la tag- kaj noktfosistoj, kaj pri la pago, kiun ili estis ricevintaj. Mi faris por tridek dolaroj monate la samon, kion ili estis farintaj por okdek. Li estus dirinta al mi tion pli frue, diris la hejtisto, se li ne estus tute certe kredinta, ke mi ne eltenos la laboron kaj iros. Sed kiel la afero nun estas, mi faras memmortigon kaj tute sensence. Mi malaltigas nur la laborpagon kaj senlaborigas du homojn. Ĉar mi estis Amerikana junulo kaj krome fiera Amerikana junulo mi ne tuj ĉesis la laboron. Tio estis malsaĝo de mi, mi scias; sed mi decidis labori tiom longe, ĝis la ĉefinĝeniero vidos, ke mi povas fari la laboron senriproĉe. Tiam mi volis iri, kaj li sciis tiam, kian lertan homon li estis perdinta.

Kaj tiel mi faris, honeste kaj malsaĝe. Mi laboris ĝis la lasta horo venis kaj mi je la sesa estis fosinta mian lastan noktkarbon. Tiam mi rezignis fariĝi elektristo, farante la laboron de du viroj por la pagado de knabo, iris hejmen, enlitiĝis por dormi ĝis la fino de l' tago.

Feliĉe mi ne restis tiom longe ĉe tiu ĉi laboro por havi daŭran domaĝon — kvankam mi ankoraŭ tutan jaron devis porti la bandaĝojn ĉirkaŭ miaj manoj. Sed la sekvo de tiu ĉi labororgio estis, ke mi ricevis naŭzon de laboro. Mi ne plu volis labori. La penso je laboro efikis terurigante. Estis tute egale al mi, ĉu mi iam atingis ion aŭ ne. La metio povis iri al diablo. Estis dekfoje pli bone gaje traveturi la mondon kiel mi faris antaŭe. Kaj mi ĵetis min denove en la aventuristan vivon kaj migris sur la reloj orienten.

Trad. *H. PEK (Konstantinoplo).*

Malnova fabelo laŭ nova modelo

L. Ivn

Regnestro tronis iam;
Li havis grandan pulon.
La pulo suĉis sangon,
La sangon de simpluloj.

Altranga estis pulo
Dum sanga mond-milito.
Ne vane ĝi ricevis
Ordenon "pro merito".

Fine la popolo
Forĵetis la regnestron,
Sed la insekto restis
En mola reĝa nesto.

Pligravan la postenon
Okupas nun la pulo.
Kaj suĉas ĝi senĉese
La sangon de simpluloj.

En Liberujo oni
La pulon timas tamen.
Sed ni, simpluloj, diras:
Sub ungon — ĝin! Kaj amen!



SIBERAI LULKANTO

PRI LA ROMANO "VIKTIMOJ" DE JULIO BAGHY

N. V. NEKRASOV

II

En la romano de Baghy ni devas nepre dividi la fonon kaj la ŝuĵeton. Kiom objektiva estas la unua, tiom subjektiva estas la dua. La pozicio de Baghy, kiu ekstere observis la panoramon, estis treege oportuna kaj li faris tion sufiĉe bone. Elektinte kiel fonon por sia romano la revoluciajn perturbojn en Siberio, li priskribis ilin fidele kaj lojale.

En la jaro 1918 kreiĝis en Siberio ekstreme komplika konjunkturo. La granda socia revolucio ĵus komencis sian neeviteblan pliprofundiĝon. Ekflamis civitana milito, senkompata kaj senindulga. Reĝimŝanĝo sekvis reĝimŝanĝon. Blankulojn anstataŭis ruĝuloj kaj male. En ĝenerala kaoso okazis multaj malnormalaĵoj kaj ofte, tro ofte teruraj faktoj aperadis sur la surfaco de la furiozanta ondegaro.

Per helaj koloroj, kvankam eble iom tro surface-filistrece, pentras Julio Baghy la bildon de la maltrankvila epoko:

> ... En aŭgusto, la "ruĝa reĝimo" agoniis jam en la Transbajkala gubernio. Sangavidaj hordoj vagadis ĉie, kies rabbesta sovaĝeco serĉis vandalajn plezurojn. La trompiĝintaj idealistoj malespere rigardis la ruiniĝon de siaj belaj sonĝoj, sed ĉia elokventeco vanis. La surpapera idealismo fariĝis *viktimo* de la maso. Oportunistoj profitis la altruistajn ideojn. Belsonaj frazoj cirkulis, ĉiutage novaj belnomaj komisionoj formiĝis, kiuj la postan tagon jam montris siajn ungojn danĝerajn. La potenco de la revolucia registaro estis forta nur kontraŭ la meza klaso kaj la kamparanoj, sed ĝi estis tute senpova kontraŭ la bandoj formiĝintaj el la liberiĝintaj kaj sin armintaj kanajloj de pundomoj. Ĉi tiuj, mortiginte siajn idealistajn gvidantojn, kiuj volis ilin bridi, rabis, murdis kaj detruis freneze, kaj ĉi tion ili nomis anarkismo.

Ni ne kritiku la mencion de Baghy, ĉu ĝi estas ĝuste vera aŭ ne. El liaj vortoj ŝajnas, kvazaŭ ĉiuj idealoj de la revolucio estis senespere trivialigataj kaj subpremataj — kaj mankis eĉ unu hela trajto. Certe, la karaktero de la revolucia movado mem, de la homoj ĝin fakte portantaj, estis iom alia, ol tion interpretas Baghy. Sed ne gravas. Oni tamen povas senti la atmosferon, kiun la revolucia spirito tiam devis trapenetri.

Kaj la atmosfero estis efektive tragedia. Tiuj realaj bildoj, kiujn Baghy objektive fotografumis en sia romano, parolas por si mem:

Ekstere li vidis tre viglan preparigon. Antaŭ ĉiuj barakoj staris soldatoj. Kelkloke jam en kvarvicoj, por ekiri. Al la sudmonta tranĉeo ĉinaj soldatoj tiris du kanonojn. Ĉe la stacidomo efektive atendis vagonaroj, kaj ne kvar, sed ses... Dekduo da maŝinpafiloj baris la vojon... Nu, jen estas la milito, pensis li kaj serĉis lokon por si en la vagonaro.

Ĉiuj vagonoj estis plenplenaj. En la kupeoj kaj sur la supro de la vagonoj kuŝis kvazaŭ haringoj la ruĝaj soldatoj. Granda tumulto ĉie. Blasfemoj, brua disputo, plendoj. Izor provis ĉe ĉiu vagono, sed nenie li sukcesis trovi lokon. Fine, ĉe la lasta vagono li alkroĉis sin al la bufro. Sur ĝi sidante li faris la sepverstan vojon.

Tiuj ĉi verecaj bildoj estas perloj de la romano. Kvazaŭ precizaj fotografaĵoj el la naturo, ili ornamas la paĝojn. Inter longaj "psikologiaj" tordaĵoj de la romano, elpensitaj kaj elturmentitaj el la kapo, tiuj simplaj bildoj impresigas per sia forta, ĉar vernatura, esprimeco.

Ili atingis la unuajn dometojn de la urbo kaj senvorte paŝadis unu apud la alia. Preter ili galopis rajdotrupo de anarkistoj, kiuj sencele pafadis en la aeron. Longa vico da trajnoveturiloj bruis sur la ŝtonpavimitaj stratoj... La ĉefplaco estis ĉirkaŭita de soldatkordono kaj en la mezo staris tremante maljunuloj, bonvestitaj virinoj, palvizaĝaj infanoj. Ili time premis sin unu al la alia. Antaŭ la *Narodni Dom* (popoldomo) kuŝis ĉe la trotuaro du mortpafitaj viroj. Sango makulis la vizaĝojn, koto la vestojn. La okuloj rigardis vitre al la blindigaj sunradioj.

Kiom kompatinda kaj mokeble fatala estas la stato de tiuj malfeliĉaj neŭtralaj pasivuloj, kiuj trafis tiel ĝuste en la mezon de la fermita cirklo de la batalkordono! Stato laŭvere malenviinda kaj malinteresa!

Kion fari? Rifuĝi? Sed kien? Malfacila demando! Okcidente baras la vojon la ĉeĥaj legioj, pri kiuj oni diras, ke ili la kaptitojn senvestigas, pelas en la riveron *Angara* kaj ĉase mortpafas ilin en la ondoj. Ĉu suden? Neeble, la ĉina limo estas bone gardata kaj tie atendas favoran okazon la rusa blanka armeo. La rusaj oficiroj estas same kruelaj. Ili, laŭdire, faras mezepokajn inkviziciojn. Ĉu kuri orienten? Jen estus falo el sitelo en barelon. La hungara ruĝa armeo rifuĝas orienten, rekte en la faŭkon de la proksimiĝanta japana armeo... Restas nur unu direkto: la nordo. Sed norde etendiĝas senlimaj stepoj, kalvaj montoj, poste glacio kaj glacio.

Jen estis la situacio!

La tuta Transbajkala gubernio estis kvazaŭ brulanta teritorio. Nur la militkaptitejo ŝajnis esti neŭtrala insulo, kie la diversnaciaj kompatinduloj ĝeme toleris la subpremon de la "Libereco". La katenoj estis pli pezaj ol dum la carismo, ol sub la plej severa disciplino de la despotismo.

La militkaptitoj de la mondmilito sidas en sia insuleto duonlibere — duonkarcere, ili timas forlasi sian neston kaj per mirokuloj observas la ĉirkaŭon.

Kaj la historibatalado dume daŭras:

La batalo ankoraŭ daŭris ĉe la barakoj de militkaptitoj, kiam la urbo jam estis okupita. La armeo blanka jam tramarŝis. Sur la stratoj cirkulis oficirpatroloj kaj ĉeĥaj legioj pasis orienten...

La ĉeĥaj legioj, eksmilitkaptitoj, ludintaj tiom fatalan rolon en la rusa revolucio... Ili, kiujn Baghy nomas mem "iloj en la mano de reakcio", "viktimoj de sia patriotismo"...

La reakcio triumfas...

La ruĝa reĝimo estas venkita...
Bolŝevistoj, anarkistoj rifuĝas per ĉevalo, veturilo, vagonaro. Kelkaj sin kaŝas en malplenaj barakoj, atendante la nokton, por forkuro. En la urbo restas sola ruĝulo, la komandanto. Jam serĝento en la cara armeo, alta, belstatura, decidiĝinta junulo. Li atendas sur sia loko, kunpreminte la lipojn, li scias morti por la ideo. Kiam oni malfermas la pordon de lia kancelario, li mortpafas la unuan enpaŝanton...

Kiom kontrasta estas tie ĉi transiro ree al la militkaptitoj:

Kaj en la barakoj restas militkaptitoj, senhelpaj, sciantaj nenion certan pri la okazoj, pri sia venonta sorto. En ekscititaj grupoj ili diskutas, divenadas, timigas sin mem per "informoj". Ili dependas de nun de novaj homoj, estas liveritaj al ilia plaĉo kaj kaprico.

Jen sur tia ĉi nigra fono Baghy konstruis sian romanon "Viktimoj"... Terura kaj malhela fono!... Nigraj, mallumaj noktoj... Fulmotondroj, ventegoj... Neĝo blanka, falanta silente per tomba tavolo...

Kaj tiel imprese, tiel fatale kvazaŭ sonas konstante super ĉio ĉi per senĉesa motivo la muziko de la "Siberia lulkanto" de Baghy.

Rakontas ĝi pri larm', sufer',
pri detruitaj rev', esper',
pri krimoj de l'militkruel'
kaj sangaj tagoj de l' ribel'...

Sed tiu ĉi fono restas nur fono, nur malproksima malantaŭa plano, kaj ni ekzamenu nun, kion Baghy prezentis sur la antaŭa sceno de sia verko.

(Finota.)



LA SKEMO DE LINGVA EVOLUO

E. SPIRIDOVIĈ

Problemo pri la loko de helpa lingvo internacia (sube ni ĉie nomos ĝin HLI) en lingva historio devigas pro ĝia plena noveco por lingvo-scienco studi ĝeneralan problemon pri karaktero kaj perspektivoj de lingva evoluo.

Ĉe komenco de la prilaboro unu el la plej gravaj momentoj estas konstruo kaj almenaŭ ĉefflanka bazigo de la fundamenta skemo de l' homara lingva evoluo. La proponata artikolo prezentas similan provon.

La ĉefa tendenco de lingva evoluo.

Ŝajnas, ke neniun sian idolon la homaro provis tiel insiste vivŝajnigi, kiel lingvon, de kiu origino, rekaptebla ŝanĝemo kaj diferencemo ĉiam ŝajnis io mistera. Eĉ ankoraŭ en la fino de la XIX jarcento kelkiuj sciencistoj konceptis lingvon, kiel organismo de iu specifa (ĉu materiala, ĉu "spirita") esenco.

Tamen, por ni, marksanoj, eĉ sen profundiĝo en detalan pristudon de la tekniko kaj de la karaktero de lingvaj ŝanĝoj, estas tute klare, ke ĉi-tie ni havas akomodon de la ĉefa ilo de interligo por bezonoj de homara evoluo kaj ke la ĉefa faktoro de ĉi-tiuj ŝanĝoj estas la ekonomio. La pleja disiĝo ekonomia dum la epoko de naturala mastrumo prezentas en lingvo senliman diversecon de dialektoj kaj idiomoj kun ilia ega diferencemo. Formiĝo de grandaj naci-regnaj ekonomiaj kompleksoj aperigas naci-literaturajn lingvojn, kiuj originas en nemalgranda parto arte sur la fundamento de popolaj lingvoj kaj dialektoj. Tuta plua evoluo de l' homaro iras al ĉiam pli granda unuiĝo ĝis la unuiĝo en la monda skalo kaj, kunligite kun ĉi-procedo, la homaro kun sama nedekliniĝo al la lingva unueco.

Iuj burĝaj sciencistoj, konstatante la fakton, ke ni observas en lingvoj, de unu flanko, egan diferencemon (precipe, popolaj dialektoj), kaj de l' aliu — unuiĝemon, konkludas per propra al ili pensmaniero, ke lingvo posedas du ecojn — diferenciĝi kaj unuiĝi. Kaj ĉi-ecoj kunpuŝiĝas kaj depende de la venko de diversaj faktoroj direktiĝas en tiun aŭ aliun flankon, kun tioma aŭ alioma intenso.

Ne ekzistas pli malutila kaj danĝera kripligo de faktoj. Jes, lingvoj dum sia evoluo diferenciĝas kaj unuiĝas. Ĉi-tendencoj ekzistas. Sed ili ne elaperas, kiel iuj misteraj "ecoj" de lingvo, ili estas rezulto de stato kaj evoluo de l' homa socio. Neprogresema stato de partuma naturala mastrumo aŭ degradiĝo ĉiflanken de la pli supera formo de mastrumo originigas, kiel *sekvon,* lingvan diferenciĝon. Kaj kontraŭe — unuiĝema tendenco en nacia kaj monda ekonomio kondukas al konforma tendenco en lingva evoluo. Kaj komplika cirkonstancaro de l' socia vivo, kiam vice kun plej superaj formoj de l' ekonomio kaj socieco tre ofte ekzistas kaj eĉ en iu grado progresas pli malsuperaj formoj, ankaŭ en la lingva evoluo igas samajn diferencecon kaj bistrecon.

Same, kiel tuta evoluo de l' homaro, la evoluo lingva ankaŭ ne pasas glite kaj laŭgrade. Kontraŭe, pro ega postrestado de lingvo, kiel ĉefa ilo de ideologio, ĝia stato en certaj momentoj tre akre konfliktas kun la stato de socia ekonomio kaj en tiuj okazoj fariĝas eksaltoj, revolucioj en la lingva evoluo. Dum la lingva revolucio tiu ĝenerala nesufiĉo da elementoj de konscia kreprocedo, kiu estas en la lingvo, tre akre elaperas kaj kompensiĝas en tioma aŭ alioma mezuro per konscia kreagado socia.

La momentoj de tiu speco estas tre bone observataj dum la kreado de naciaj literaturaj lingvoj. La lastaj estas la unua ŝtupo de la homara lingva evoluo, kiam unuan fojon en kompare granda grado elaperas konscia kreagado de l' homaro tiel, ke la naci-literaturaj lingvoj eĉ akiras karakteron de preskaŭ duonartefaritaj (ĉi-tion konfesas eĉ la oficiala lingvoscienco).

Same, kiel ekonomia evoluo ĉiam kondukas de naturala mastrumo al la interŝanĝa, la plej supera formo de kiu estas kapitalismo; same, kiel la homa socio pro tio ĉiam evoluas de partumaj komunumoj al formiĝo de nacio; — same la lingvo sub influo de ĉi-faktoroj evoluas de popola, parola lingvo, dispeciĝinta je multegaj dialektoj, al nacia lingvo, unuiganta la nacion. Ĉi-lingvo, aperanta kun evoluo de komerca kapitalismo, estas literatura lingvo, ĉar la bazo, sur kiu ĝi estas fondata, estas skribeco kaj ĝi estas kreata per uzo en literaturo. Kolektiva literatura kreado faras severe normigitan lingvon kompare kun la popola. Ĝi estas en iuj elementoj pli riĉa kaj en aliuj pli malriĉa kompare kun la popola. La artefariteco de literatura lingvo konsistas el konscia ordigo kaj normigo de senkonscie kreitaj elementoj de popola lingvo. Popola kaj literatura lingvoj estas kreataj kolektive, kvankam la unua estas ellaborita senkonscie kaj la lasta grandparte konscie.

En kontraŭo al malkonscia kreado de popola "natura" lingvo, la konscia kolektiva kreado, kunmetiĝanta neeviteble el penoj de apartaj individuoj, ricevas nomon "artefarita". Dum evoluo de nacio la duonartefarita literatura lingvo fariĝas parola kaj kvankam ĝi havas iun tendencon evolui,

kiel popola lingvo, tamen sub normiga influo de literaturo ĝi plenece konservas sian unuecon, kio konformas al postulo de progresanta ekonomia unueco. Kvankam kreita duonarte, sed enirinta karnon kaj sangon de nacio, la literatura lingvo fariĝas en opinio de la nacio "la plej natura" lingvo. Kaj dum komencas evolui luktado de la du principoj — nacia kaj internacia, — en interlingva lukto ĉi-tio esprimiĝas en antaŭigo de allogaĵoj de la "naturaj" naci-literaturaj lingvoj kontraŭ la "artefarita" HLI.

Ĉiuj observoj pri evoluo de popoloj kaj lingvoj senescepte konstatas la solan vojon de lingva evoluo: *la vojon de popolaj lingvoj al la naci-literatura, kio rilate al la tekniko de ilia kreo ĉiam estas esprimata en pligrandigo de elementoj konsciaj por malprofito de la malkonsciaj.*

Estas neniuj cirkonstancoj, kiuj devigus supozi kontraŭan iron de la lingva progreso. Kontraŭe, dum la epoko de rapidega evoluo de la tekniko kaj scienco la lingvo — la plej ĉefa ilo de la homa ideologio — ne povas kontentiĝi pri tio, kion povas doni ĝia malkonscia, sed "natura" evoluo. De aliu flanko, entiro en la mondan kulturon de eĉ plej malprogresintaj popoloj kun iliaj primitivaj lingvoj neeviteble aliformigas laŭ postuloj de l' tutmonda kulturo la manieron kaj konstruon de ilia pensmaniero, sekve aŭ al ega, certe arta rekonstruo de iliaj lingvoj (ĉi-tio estas kreo de naci-literaturaj lingvoj), aŭ al asimiligo de ĉi-popoloj, t. e. al alpreno de alia, pli konforma al postuloj de perceptita kulturo, lingvo.

Kun ĉi-tiuj cirkonstancoj, eĉ nemenciante dume pri HLI kaj pri kaŭzoj, ĝin naskintaj, ni tute konvinkiĝas, ke la plua lingva evoluo de l' homaro iras la vojon de malmultiĝo kaj laŭgrada mortiĝo de l' elementoj senkonsciaj, "laŭnaturaj" kaj la vojon de pligrandiĝo de l' elementoj konsciaj, "artefaritaj".

Kondiĉeco de la konceptoj: "laŭnatura" kaj "laŭarta".

Kelkiaĵo jam estas dirita pri ĉi-demando plisupre, sed ĝi estas tiel grava por nia temo kaj multaj K-doj — eĉ luktuloj pro HLI tiel ofte misopinias pri ĝi, ke ni devas iomete pritrakti ĝin.

Ni fiksu antaŭ ĉio la plej ĝeneralan signifon de l' konceptoj — "laŭnatura" kaj "laŭarta". "Laŭnatura" oni nomas ĉion, kio okazas laŭ la leĝoj de la naturo sen iu partopreno de la volo (kvankam senkonscia) de vivaĵo. Ĉio "laŭarta", kontraŭe, supozigas por sia ekapero la volon almenaŭ senkonscian de vivaĵo. De tiu-ĉi vidpunkto la lingvo ĝenerale ne estas laŭnatura, ĉar ĝi estas produkto de la homa agado. Pri ĉi-tio tute konsentas eĉ malnovaj lingvoscienculoj. Kvankam la lingvo, precipe dum la komenco de sia evoluo, estas kreata senkonscie, la fakto mem de ĝia ekapero kaj evoluo tute dependas de kolektiva homa volo. Se ni de tiu-ĉi ĝenerala vidpunkto konfesus la lingvon laŭnatura, ĉi-tio, certe, devigus nin ankaŭ konfesi laŭnaturaj fenomenoj tiujn primitivajn kreaĵojn de homoj kaj bestoj, kiel ekz. bastono, nesto, digo de kastoro ktp. Ĝenerale, la konfeso pri la lingvo kiel laŭnatura en la menciita senco tute konformas al la antikva statika mondkompreno, naive supozanta subitan ekaperon de homo kaj kune kun ĝi jam pretan lingvon, laborilojn ktp.

Se ni konfesos la lingvon origininta laŭarte, same kiel ĉiuj iloj de homo, tiam ni eĉ sur ĉi-grundo povos plene analogii ĝin kun aliuj homaj iloj. La komenca evoluo de homaj iloj estis tute senkonscia, la ŝanĝoj en tekniko de ilia produktado estis preskaŭ nerimarkeblaj, ofte ili estis konceptataj kiel inspiroj de l' ĉielo. De tio aperis adoro al tre ŝatataj iloj, atribuo al ili precipajn kvalitojn, adapto por iuj agoj (ekz., ritoj) ilojn de severe difinita tipo, eĉ iam propra nomdono al precipe ŝatata ilo (ekz. glavo). Unuvorte, en similaj fenomenoj ni vidas frapantan ekzemplon de *fetiĉigo de iloj.*

Sed kompare kun la lingvo la tekniko de produktado de iloj tre baldaŭ akiras karakteron de konscia perfektigo en ilproduktado, kiam oni jam povas nomi apartajn inventintojn. La ilfetiĉismo baldaŭ preskaŭ malaperas, al ĉiuj estas finfine klara artefariteco de iloj (eĉ demando pri ĉi-tio preskaŭ ne estas elŝovata) kaj la plej grava: ekonomia profiteco ĉi-tie estas la plej mortiga malamiko de restaĵoj de la fetiĉismo.

Niaepoke eĉ konceptoj mem pri "laŭnatureco" kaj "laŭarteco" rilate al laboriloj ne ekzistas. Neniu, krom sovaĝulo, motivigos sian rifuzon veturi en trajno per tio, ke la trajno estas artefarita. Certe ankaŭ ni ne skribus tiel longe pri ĉi-tio, se rilate al lingvo ĝis nun la plejmulto eĉ de ne "simplaj mortuloj", sed eĉ de scienculoj ne starus sur ĉi-vidpunkto de sovaĝulo. Ĉi-sovaĝuloj diplomitaj same, kiel iliaj pravaj samnomuloj, aliras al ilo ne kun kompara pritakso de ĝia kvalito kaj profito, sed laŭ la sama analogio: — "Esperanto estas lingvo artefarita, tial, malgraŭ ĝiaj avantaĝo kaj profitdoneco, for ĝin! — Saluton al malkonscieco, al «naturaj» lingvoj!" Por ni la plej ĉefa estas pritakso de kvalitoj de ilo, por ili — ties stampo: ĉu dea ("natura"), ĉu homa.

La esenco de la moderna tekniko estas ĝia "artefariteco", kaj malgraŭ tio, ke la aŭtorojn de ĉiu novinventita malgravaĵo en ĝi oni povas nomi, ĝi estas certe kolektiva krelaboro de l' homaro. Kaj la vojo de ĝia evoluo de malkonscia kreado de prahomo ĝis la moderna tekniko, en kiu oni, ŝajne ne povas eĉ eron de malkonscielementoj trovi, tiu vojo estas *tute natura* ĉar aliun vojon de progreso, kiel transiro de malkonscia al konscia, krea laboro, la homaro ja eĉ ne konas, *ja en ĉi-tio estas esenco de la homara kulturo, sekve de la homo mem.*

Kaj rilate al la lingvo, kiel ilo de homa komuniko, aliaj leĝoj ne estas: *la plej natura lingva evoluo estas la vojo de malkonscio al konscio, de "laŭnatureco" al ĉiam kaj ĉiam pleja "artefariteco".* Ĉi-tion konstatis por ni ne nur klare observita tendenco en jam ekzistanta praktiko de la lingva evoluo, sed eĉ ĉi-tiu malgranda ĝenerala ekskurso en evoluon de tekniko. Ni vidas, ke *la vojo de lingva evoluo koincidas kun ĝenerala vojo de teknika evoluo.*

Ŝajnus, ke al ni, adeptoj de LI, oni povus ne multe paroli pri ĉi-tio. La artikolo ja ne estas skribita por kontraŭuloj de LI. Sed bedaŭrinde oni devas konfesi, ke la lingva fetiĉismo tiel enradikiĝis en la homa menso, ke estas ne malmultaj adeptoj de LI, kiuj kunigas en si du tute neinterpaciĝeblajn aĵojn — adeptecon al LI kaj lingvan fetiĉismon. Ekzistas proletaj esperantistoj, kiuj konstruas proksimume jenan skemon:

— Lingvo povas evolui nur per la natura vojo, t. e. per la vojo de malkonscia kresko de ŝanĝoj en "viva" lingvo. Tial ankaŭ unuiĝo de lingvoj sub influo de l' ekonomia evoluo de l' homaro iros similan vojon. Sed ĉar la "natura" procedo estas tre malrapida, kaj la postuloj de vivo ne povas atendi, homoj elpensis "artefaritan" lingvon — helpan. Ĉi-lingvo estos uzata paralele kun la patra kaj ekzistos ĝis kreiĝos per "natura" vojo universala lingvo internacia (ĉie sube ni mallongigite skribos: ULI).

Ĉi-kamaradoj evidente konsideras HLI-n, kiel iu surogato, uzebla nur dum ni atendas ekster nia volo evoluantan "naturan" LI. Sed ni vidis, ke lingva evoluo de l' homaro iras la vojon, kiu jam mem malakceptas ilian skemon: jam naci-literaturaj lingvoj parte perdas malkonscie ellaboritajn elementojn kaj tial jam estas parte artefaritaj. Lingva evoluo retroen ne iros. En la pritraktata skemo HLI okupas tute hazardan lokon. Anstataŭ laŭleĝa fenomeno antaŭ ni estas iu ŝtopilo, lasanta pasi du paralelajn procedojn: unuflanke — evoluo de HLI (ja neniu povos nei, ke HLI ne falas de l' ĉielo, sed estas produkto de kolektiva kreado de amasoj, unuavice proletaj, kiuj progresis ĝis necesego havi ĝin), kaj duaflanke — daŭranta procedo de malkonscia evoluo de naciaj lingvoj ankaŭ flanken al LI. Kio kaŭzis ĉi-tiujn du samtempajn procedojn? Kial dum ellaboro de ULI oni devas malprogresi de preskaŭ duon-

artefaritaj naci-literaturaj lingvoj al malkonscia evoluo simile al popolaj dialektoj? En kio konsistas teknika supereco de tiu malkonscie ellaboriĝanta ULI kompare kun duonartefarita HLI? Ja oni supozas, ke HLI estos tutmonde uzata ĝis ellaboriĝo de ULI kaj estos iam momento, kiam ĉiuj lasos HLI kaj transiros al ULI. Kio do kaŭzigos ĉi-salton kaj kiam okazos la momento por ĉi-tio? Ĉu montris ie la ekzistanta praktiko de malkonscia lingva evoluo sian superecon kompare kun la lingvo, kreita per konscia racio kaj volo de kolektiva homo? ktp., ktp. Ŝajnas al ni, ke jam ĉi-tiuj demandoj eĉ sen la respondoj montras tute klare, ke ni havas antaŭ ni la skemon, bazitan sur vento, kaj havantan nur solan klarigon: penon altiri HLI-n "per hararo" (kiel diras ruslingvanoj) en la tombon de l' oficiala lingvoscienco, evoluiĝinta sur la burĝa grundo kaj nutrita per lingva fetiĉismo.

La esplorita de ni skemo estas ne en malgranda grado nutrata de konvinkeco, ke sub influo de reciproka ekonomia kaj kultura komunikado de nacioj en la lingvoj kreskas kvanto de internaciaj, tiel nomataj "fremdaj" vortoj, kaj aliuj lingvelementoj kaj ke ĉi-tio finfine alkondukos per "natura" vojo al ULI. Ĉi-tiu graveĝa problemo certe postulas specialan esploron. Sed ni por nia temo limigos nin en la sekvonta ĉapitro per iuj konsideroj pri ĉi-problemo.

(Daŭrigota.)



KONDUTISMO

KARL FRÖDING

La psikologio, la scienco pri la "animo", estas nun fervore studata en Ameriko. Ne nur la tiel nomata nova psikologio, kies ĉefaj elstarantaj trajtoj estas la psiko-analizo kaj la kueismo (Coué, franca memsugestiisto ĵus mortinta), sed eltroviĝis ankaŭ nova sistemo tute malsimila al la alia. Ĝi nomiĝas "kondutismo", ĉar ĝi studas la konduton de homoj.

La kondutismo revoluciiĝas la psikologion. Ĉar la aliaj sistemoj, ĉu malnova, ĉu nova psikologio, traktas la animon kiel estaĵo tute aparta de la korpo, kvankam ĝi kuniĝas kun la korpo por vivigi ĝin. Ke oni nun forlasis la vorton "animo" kaj anstataŭigis per "menso" aŭ laŭ la skolo de Wundt (fondita 1879) per "konscio", ne gravas, ĉar la signifoj de tiuj vortoj estas la samaj. Oni ŝanĝis la vorton, sed restas la sama afero, la nevidebla, neeltrovebla, neniam spertata "animo" tute sama. Laŭ la kondutismo la animo estas nur fantaziaĵo mitologia de tempoj pasintaj. Ne ekzistas animo: ekzistas nur korpo, kiu kondutas tiel aŭ tiel laŭ la kaŭzoj tute naturaj kaj materiaj. Alivorte la korpo reagas al eksteraj influoj.

La kondutistoj studas la konduton de homoj laŭ diversaj influoj, de ili nomataj "stimuloj", kaj faras el tiuj studoj novan sciencon, la veran psikologion, per kiu ili promesas povi tute antaŭvidi la konduton de homoj, tutsame kiel la astronomoj antaŭvidas eklipson, aŭ kiel la kemiisto povas kalkuli la rezulton de kemia eksperimento. Antaŭvidante la konduton de homoj, oni povas ankaŭ regi ĝin; oni bezonas nur okazigi tiajn influojn, kiaj produktas la konduton deziratan.*) Kontraŭe la introspekta metodo de la malnova psikologio nenion povas pruvi, ĉar studante la konscion oni povas nur studi sian propran. Alivorte la malnova psikologio estis subjektiva, la nova objektiva. La aferojn

*) Bonega novaĵo por la ekspluatistoj de N. Ameriko. Sed kompreneble la ekspluatatoj povas ankaŭ studi la kondutismon kaj ekuzi ĝin. Aŭ ĉu ĝi estos malpermesata, kiel estis dum la lasta milito la frenologio.

subjektivajn oni ne povas pruvi, oni ne povas montri ilin al aliaj personoj. Eĉ kiam la malnovpsikologoj faras eksperimentojn, ili ĉion rilatigas kun la mensoideologio kaj parolas kaj pensas en la terminoj religiaj de la mezepoka filozofio.

Pensado kaj mensaktiveco laŭ la kondutismo ne ekzistas, almenaŭ ne en la malnova senco de tiuj vortoj. Kiam stimulo ne kaŭzas eksteran kaj videblan respondon, ĝi kaŭzas internan nevideblan. Kiam la muskoloj, kiuj regas la parolajn organojn, estas tiel movigitaj, tiam oni parolas. Sed la socio malpermesas al ni paroli je ĉiu ajn stimulo, do oni devas nefunkciigi la parolorganojn. Oni faras tion simple dekuplante la parolorganojn, lasante la internajn muskolojn movi sin tute same. Tiam oni pensas. La infanoj devas lerni la dekupladon kun multe da peno, kaj ili daŭras lerni, ĝis ili estas plenkreskaj, kaj eĉ poste. Pro tio la infanoj malgrandaj ĉiam parolas; ili ne lernis ankoraŭ la dekupladon. La vorto "pensado" do ne estas bona vorto, prefere oni devus diri mallaŭta aŭ silenta parolado.

La nova psikologio estas utila en la traktado de krimuloj. Ĝi montras al ni, ke la nuna metodo puni la krimulojn estas tute netaŭga. Efektive la krimulo ne estas kulpa pro siaj agoj, estas kulpa la socio, kiu okazigas stimulojn al krimoj. Alivorte, la krimuloj bezonas antaŭ ĉio sciencan psikologian edukadon.

Kiel patro-apostolo de la kondutismo oni povas rigardi d-ron John B. Watson, eksprofesoro de kompara psikologio ĉe la Universitato John Hopkins (Novjorko). Lia unua manifesto pri kondutismo, nomita "Psychology from the standpoint of a Behaviorist" (psikologio el la vidpunkto de kondutisto) aperis en la revuo "Psychological Review" en la jaro 1913. "Introspekta psikologio", li diras, "estas tiel malhelpata de la religia superregado, ke ĝi ne povas esti nomata scienco. Konscio estas nur nova nomo por la malnova koncepto de la animo, kiu ne trovas lokon en scienco." Lia unua libro nomata "Behavior, An Introduction to Comparative Psychology" (Kondutismo. Enkonduko al Kompara Psikologio) aperis en 1914, kaj lia dua libro, "Psychology from the Standpoint of a Behaviorist", aperis en 1919. Nun ekzistas pli nova verko de Watson, "Behaviorism" (1924), kaj verkoj de aliaj aŭtoroj, eldonitaj de W. W. Norton & Company, en Novjorko.



IOM PRI VITAMINOJ

D-ro ANDREO FIŜER

La nutraĵo ludas duoblan rolon en la vivo de homa organismo: unue, ĝi servas kiel konstrumaterialo por anstataŭi la eluzatajn kaj formortantajn konstruerojn de la korpo; due, ĝi estas por la organismo tio sama, kio estas brulmaterialo por maŝino, t. e. fonto de laborenergio. Do, la valoro de nutroŝtofoj estas taksenda laŭ tiuj du vidpunktoj.

Kiel *konstrumaterialo* la nutraĵo devas enhavi la ŝtofojn, kiuj konsistigas la homan korpon; tiu lasta konsistas, precipe, el diversspecaj albuminoj kaj, plue, el grasoj, karbonhidratoj, saloj kaj akvo. Plej gravaj *brulŝtofoj*, bezonataj de laboranta homa organismo, estas karbonhidratoj (amelo, sukero) kaj grasoj. Mezkvante la homo, por vivi, esti sana kaj labori, bezonas ĉiutage 80—100 grm. da albuminoj, 70—80 grm. da grasoj, 500—600 grm. da karbonhidratoj kaj sufiĉan kvanton da mineralsaloj kaj akvo.

Do oni povus opinii, ke donante al homo la diritajn kvantojn da *ĥemie-puraj* nutroŝtofoj, ni kontentigus ĉiujn nutrobezonojn de lia organismo. Tamen multenombraj tiurilataj eksperimentoj kun bestoj evidentigis, ke tio ne sufiĉas: diversaj animaloj (hundoj, kokinoj, kolomboj), nutrataj per ŝajne tute kontentiga kvante kaj kvalite nutraĵo, entenanta *ĥemie-purajn* albuminojn, karbonhidratojn, grasojn k. c., malgraŭ tio malsaniĝis, konsumiĝis kaj fine mortis. Tion saman oni spertis pri homoj, devigitaj dum militoj aŭ longedaŭraj esplorvojaĝoj (precipe polusaj) sin nutri per konservaĵoj: ili malsaniĝadis je skorbuto; precipe malutila montriĝis foresto de freŝaj legomoj. En Japanio kaj aliaj orientaj landoj, kie la loĝantaro sin nutras ĉefe per rizo, oni rimarkis, ke homoj, manĝintaj dum plimalpli longa tempo unukvalitan, tiel nomatan "poluritan" rizon (senigitan je sia haŭteto), malsaniĝadis je "beri-beri", dormomalsano, karakterizata per gravaj nervofenomenoj, konvulsioj, paralizo kaj — fine — morto.

Ĉi-faktoj klare montras, ke nia nutraĵo, krom la nomitaj albuminoj, karbonhidratoj, grasoj k. c., devas enhavi ankoraŭ iujn aliajn substancojn, ne konatajn de ni, kies foresto tamen estas tre malutila por nia organismo. Ĝis nun oni ne sukcesis eligi ĉi-substancojn el diversaj nutroŝtofoj, tamen ties ekzisto estas tute senduba. Oni nomis tiujn iom misterajn substancojn — *vitaminoj.* Povus ŝajni stranga, ke oni parolas pri ŝtofoj, kiujn neniu sukcesis ricevi en pura stato en pli-malpli granda kvanto, — sed similajn faktojn ni jam konas en fiziologio; ekzemple, pri la digestofermentoj, enhavantaj en salivo, stomaka suko, pankreata suko k. s., ni juĝas laŭ ilia digestiga efiko, kvankam ni ne sukcesas eligi ilin el la digestosukoj en konsiderinda kvanto kaj pura stato.

Diversflankaj observoj kaj eksperimentoj montris, ke ekzistas multaj specoj de vitaminoj, havantaj ĉiu sian apartan efikon kaj valoron. Jam nun oni povas distingi tri ĉefajn specojn, kiujn laŭ propono de amerikaj fiziologoj oni nomas 1) vitamino *A,* 2) vitamino *B* kaj 3) vitamino *C.*

Vitamino A estas vitamino de kresko kaj influas normalan disvolviĝon de organismo, — do ĝi estas aparte necesa por infanoj. Ĝi troviĝas en animalaj grasoj, butero, fiŝoleo, lakto (ne senkremigita), ovoflavaĵo k. c.; vegetalaj oleoj ĝin tute ne enhavas.

Vitamino B akcelas normalan sinnutron kaj normalan konsiston de la sango; ĝia manko okazigas anemion kaj en aparte gravaj kazoj la dormomalsanon. Ĝi troviĝas en ne polurita rizo (kies grajnoj konservis sian haŭteton), pizoj, fazeoloj, seka feĉo k. s.

Vitamino C estas precipe kontraŭskorbuta; ĝi troviĝas en freŝaj legomoj kaj fruktoj: brasiko, oranĝoj, citronoj, tomatoj, rapoj, karotoj, betoj k. c.

Estas grave, ke ĉiuj vitaminoj difektiĝas, se oni trovarmigas ilin. Tro longa kuirado de lakto, legomoj k. c. influas malbone: la vitaminoj malaperas.

Konklude oni povas ripeti, ke la vitaminoj estas necesegaj akcesoraj nutrofaktoroj; ilia foresto en nia ĉiutaga nutraĵo povas fariĝi kaŭzo de plimalpli gravaj malsanoj.



ŜOVINISMO EN LA BRITA LERNEJO

MARK STARR

La instruistoj de Francio antaŭ kelkaj jaroj enketis pri la ŝovinismo en la lernolibroj kaj malkovris la tre danĝeran venenon, kiun ili trovis[1]. En Britio la instruistoj eĉ ne konsciis pri la ekzisto de tia afero ĝis la fondo de la TLL (Instruist-Laborista Ligo, brita sekcio de la Edukista Internacio), en kies programo en 1925 estas la celo: "forigo de la imperialisma instruo el la edukataj institucioj". Ĉar en Britio daŭras la loka aŭtonomio de la edukada aŭtoritato, ne troviĝas iu grandskala ŝtata plano por propagandi la patriotismon tie ĉi. Plue, en ĝia nasklando, kapitalismo evoluis malrapide kaj senkonscie kaj antaŭ la enkonduko de ĝenerala edukado. Kapitalista patriotismo estas pli aĝa ol la lernejo elementa[2]).

En Britio nur malmultaj nekonformistoj kontraŭas la instruon de la oficiala eklezia katekismo al siaj infanoj. Multaj anoj de la Laborista Partio sendiference admiras ĉian edukadon. La oficiala programo de la Laborista Partio atentas nur pri kvanto, ne pri kvalito, de l' edukado. Multaj instruistoj blinde argumentas, ke edukado restu "super la batalo" kaj ke "politiko ne eniru la lernejon".

Opinioj de Wells kaj Russell

Sed ŝanĝo okazas. Eĉ ne marksistaj verkistoj Bertrand Russell kaj H. G. Wells avertis pri nacieca "koridora" historio kaj elkovris la efektivon, se ofte senkonscian, diktatorecon mensan, kreatan en la lernejo. Bertrand Russell difinis la novan instruon de la tielnomata civitismo (civies) esti "dresado de la junulo morti en batalo pro kapitalistaj dividendoj". H. G. Wells en "Postsavo de Civilizacio" (Salvage of Civilization) atakis tiele la lernejon en 1921 j.: "Ĉie en Eŭropo procedas en ĉiu nacia lernejo, en ĉiu patriota eklezio, en ĉiu nacieca ĵurnalaro, en ĉiu intense naciigita literaturo, la unuecdetrua propagando de patriotismo. La lernejoj de ĉiuj Eŭropaj landoj, apenaŭ senescepte, instruas la plej rancan patriotismon; ili estas la centroj de abomena infekto. La infanoj de Eŭropo kreskante akiras intensecon de nacia egotismo, kiu faras ilin, por ĉiu pratika internacia celo, esti frenezuloj. Ili ne heredas ĝin, sed infektiĝas tiel baldaŭ, kiel ili povas legi kaj skribi. La brito lernas pri nenio krom la gloro de Britio kaj la Brita Imperio; la franco koncentriĝas, se eble pli freneze, pri Francio; la germano ĵus resaniĝas pro la terura sekvo de dumkvardekjara intensa nacieca edukado ... Nia plej grava tasko en Eŭropo estas, je iu kosto, liberigi niajn infanojn el tiu ĉi nanieca obsedo (obsession = ideaĉo elposedanta iun); instrui al la amaso de la Eŭropa popolo iometon de vera historio, per kiu ĉiu naciano vidos la estintecon kaj estantecon de sia nasklando en ĝia korekta proporcio; ankaŭ instrui laŭfakte etnologion, per kiu ĉiu nacianaro evitos la eraron, ke ĝi estas

---

[1]) "Kontraŭ instruado pri malamo (Oficiala raporto de la franca sekcio de Edukistara Internacio)" — "Novaj Tempoj", majo 1922, n-o 5; "Sekvoj de milito ĉe lernejo" (Oficiala raporto de Eduk. Int.) — "N. T.", junio 1922, n-o 6.

[2]) Komparu kun Francio, kie la republikano kaj la katolikano antaŭmelonge furioze interbatalis por kapti la lernejon.

aparta kaj individua raso. La instruo, de historio en Eŭropo estas ĉe la koro de la afero." Por kuraci la malsanulon Wells mem poste verkis "Skizon de Mondhistorio" (1919), kiu tradukiĝis multlingven kaj multe disvendiĝis speciale en Usono. Kompreneble, Wells nur advokatas "Usonon de La Mondo" (Unuigitaj Mondŝtatoj) kaj ĉe eldono de lia verko fidis multe la Ligon de Nacioj.

Instruo de Imperialismo

Aŭskultis al Russell kaj Wells nur malmultaj instruistoj kaj lernejestroj. Kontraŭe, multaj ĵus eldonitaj lernolibroj substrekas la gravecon de la Brita Imperio kaj neceson de la reĝo kiel ligilo por la afero. Ekzemple dum la granda ekspozicio, starigita de la Brita Imperio ĉe Wembley en 1924 j., eldoniĝis, benita de la Ministro de Edukado, "Ĉiusemajna Bulteno de Studo Priimperia" (Weekly Bulletin of Empire Study). Proksimume 125 000 ekz. estis uzataj de instruistoj dum 24 semajnoj por almenaŭ 1 500 000 infanoj. Ĉiusemajne 150 000 infanoj vizitis la Ekspozicion mem. Kandidatoj en oficialaj ekzamenoj povis plenumi specialan imperi-studan fakon. La ĵurnaloj organizis konkursojn por tezoj pri la Imperio. Laŭ la suprenomita "Bulteno" la Brita Imperio estas "frataro el liberaj nacioj" kunelaborantaj por ideala justeco! En "Historio" verkita en 1911 j. de Fletcher kaj Kipling oni povas legi (pĝ. 222) "Ne estas kun lipoj nure, ke ni lojalas al la Reĝo Georgo V-a, sed kun niaj koroj ankaŭ. La krono ne estas nur la "ora rondo", kiu kuneligas la Imperion. Ĝi estas la plej granda afero en tiu ĉi Imperio."

Certe necesas la laboro de la ILL en Britio. Verdire la ŝovinistema lernolibro ne posedas la tutan kampon. Multaj aŭtoroj, reagante kontraŭ la malnova "tambur-trompeta historio", verkis priskribojn de la ordinara socia vivo. La serio "Piers Plowman" kaj la verkoj de Qvennel estas citindaj. Sed tiuj ĉi verkoj ignoras la klasbarakton kaj tiel senfortiĝas de la laborista vidpunkto.

Laŭ oficiala kodo "politiko restu ekster la lernejo, sed en la historio memevidente la vidpunkto de la instruisto devas aperi. Ankaŭ en la kreskanta instruo de ekonomio kaj civitismo. Sed eĉ en gramatiko kaj lingvoj oni devas doni ekzemplojn. Oni ne povas, instruante Esperanton, uzi "Petro'n" en burĝa lernejo. En la fama angla gramatika lernolibro de Cobbett[1]), ekzemple estas multaj atakoj kontraŭ la nobeloj en la modelfrazoj. Maldungo minacis instruiston en Suda Kimrujo, ĉar li komparis eĉ en la aritmetika leciono la salajron de ordinara instruisto kun tiu de la oficiala edukadestro. En la nova temo de Homa aŭ Ekonomia Geografio la instruisto, se li ne estas stultulo, devas kunigi la nafton de Irako kun la brita almilito kaj la feron de Maroko kun la franca konkero de tiu ĉi lando. Tiom la klasbarakto intensiĝas, kiom ĝi evidentiĝas en la lernejo. La instruisto konscie devas decidi, ĉu li aŭtomate subtenu la nunan sistemon kaj propagandu la imperialismon aŭ helpu la evoluon de la nova justa sistemo kun la laboristaro. La vera instruisto ne restos hipokrite "super la batalo", sed batalos en la avangardo de progreso.

Kulpoj de la Lernolibro Historia

Ĝi mensogas por silento pri aliaj nacioj. En iu listo de libroj uzataj, Eŭropaj kaj mondaj historioj staras en tre malgranda proporcio rilate al

---

[1]) Cobett (1762—1835) estis eminenta publicisto-aŭtodidakto, estinta kamplaboristo. Li batalis por reformo de la voĉdon-leĝaro, por la rajtoj de laboruloj; li estis eldonanta semajnan gazeton "Political Register" (1818—1819 kaj 1823—1825). — *Red.*

naciaj lernolibroj. Ĝenerale la brita nacio ŝajnas marŝi aparte en propra koridoro kaj la eniro de la romanoj kaj de la normanoj ktp. restas sen klarigo. La mondo ekzistas ŝajne kiel entreprenejo por la brita raso.

Kelkfoje la lernolibro atakas aliajn naciojn. La Fletcher-Kipling'a "Historio" ne diris la veron pri la ribelo de Usono en 1793 kaj rikanas pri la motivo de ĝi. En preskaŭ ĉiu nova lernolibro, la aŭtoro kulpigas Germanion por la Granda Milito 1914—1918 kaj pridiris la *germanan* kruelegecon, sed mallonge kaj ne tiom kiom faris la francaj ŝovinistoj laŭ malkovro de la verkoj de Lavisse, Gédalge (eldonisto), Gauthier, Descamps k. a. Sed estas distingo nur de kvanto.

La glorigo de l' Imperio kaj la metodo de akiro prezentiĝas en la plejmulto de ordinaraj lernolibroj. La aŭtoroj konvene ignoras la fakton, ke malmultaj blankuloj subpremas proksimume 400 milionojn el aliaj rasoj, kaj forgesis pri la agitado pro memrego en Hindio kaj Egiptio. Ofte la verkisto kontente diras, ke la Brita Imperio estas jam la Ligo de Nacioj, kiu efektive funkcias kaj "la plej granda povo por bono, kiu iam ekzistis tutmonde".

Laŭdo kaj glorigo de milito kaj forto malofte troviĝas en la brita lernejo nuntempe. Sed en la historio de Fletcher-Kipling — eldonita en 1911 j., multe uzata kaj ankoraŭ estanta sur listo reviziita de la grava Edukada Konsilantaro de Londono (LCC), okazas la jenaj paragrafoj.

P. 145: — "Viroj (en la Stuarta epoko) malamis la militservon kaj evitis ĝin kiel eble plej multe; ili parolis sensaĝe, ke Anglio ne bezonis armeon, kiam ĝi posedis grandan militŝiparon. Vi aŭdos ofte similan sensaĝaĵon hodiaŭ; ne kredu ĝin."

P. 162: — "...servi la reĝon en la armeo estas la dua plej bona profesio por angloj el ĉiu klaso; deĵori en la militŝiparo, mi supozas, ĉiuj konsentas, tio estas la plej bona."

P. 186: — "La Imperio fondiĝis en komerco kaj per ĝi devas konserviĝi. Sed memoru, ke granda komerco necesas grandan defendon per granda ŝiparo kaj granda armeo. Oni ricevas nenion por nenio en tiu ĉi mondo."

P. 244 - 5: — "Se iam granda milito ekplodas en Eŭropo, la nacio plej preta per sia ŝiparo kaj armeo venkos... la nura sendanĝera (sekureca) agado, por ĉiu el ni, kiu amas sian landon, estas lerni soldati tuj kaj prepari batali iumomente."

Ĉu komento necesiĝas pri tiaj danĝeraj mensogoj, kiuj preparis la britan nutraĵon por la kanonoj de 1914—1918?

La Antaŭinklinoj

Dividiĝas ĝenerale la antaŭinklinoj de la lernolibroj jene: —

(a) *Nacieca.* La subtenantoj de la Ligo de Nacioj malkovras kaj atakas tion ĉi. Ĉiu naciano parolas senkaŝe pri la antaŭjuĝo de alia nacio. Utila verko de tiu ĉi vidpunkto estas: "Minaco de Naciismo en Edukado" de J. F. Scott (Allen & Unwin 6-a/6-d, Londono 1926). En ĝi la lernolibroj britaj, francaj kaj germanaj kompariĝas. La minaco certe ekzistas kontraŭ mondpaco, sed laŭ aŭtoro, simile al multaj aliaj, ne konscias alian pli fundamentan antaŭinklinon[1]).

---

[1]) Analoga verko kun tre interesa dokumentaro aperis franclingve, eldonita de la "Eŭropa Centro de l' Dotacis Carnegie por la Paco Internacia": Enquête sur les livres scolaires d' après-guerre, Paris, 1924, 452 pages, (Enketo pri la postmilitaj lernolibroj. Paris, 1924, 452 paĝoj). Ĝi enhavas revuojn pri Francio, Belgio, Germanio, Aŭstrio, Britio, Italio kaj Bulgario. — *Red.*

b) *Klaspartieco.* Tio ĉi esprimiĝas en la mensogo per silento pri demokrata, laborista, socialista kaj kooperativa movadoj. Malestime la verkistoj de lernolibroj ĉiam parolas pri la amasaĉo (mob), kiu detruis la Bastille en la Franca Revolucio. Wat Tyler (estro de Kamparana Ribelo, 1381) kompariĝis malfavore kun la kuraĝa juna reĝo (Richard II.), kiu trompe promesis helpi la kamparanojn, sed poste buĉis ilin. Fletcher-Kipling nomis Jack Cade (estro de protesto en 1450 kontraŭ la alpreno en la farmejoj de la kamparanoj por la profito de la grandaj nobeloj) sentaŭgulo ("scamp") kaj multe rikanis pri la Franca Revolucio. La sama verko diras, ke la Ĉartistoj (agitantoj por balotrajtoj kaj aliaj necesaj plibonigoj) nur volas doni voĉdonojn al la needukitoj. La eventuala frenezeco de O' Connor (la ĉartista estro) trovas lokon en alia libro kiel partklarigo. Oni ne povas miri, ke kiam la rusaj kamaradoj en Murmansk disĵetis aeroplane folietojn, kiuj alvokis al la brita soldato ke li revenis hejmen kaj imitu siajn ĉartistajn antaŭulojn, li ne povis kompreni, ĉar li neniam aŭdis pri la granda agitado por havi la politikajn rajtojn. Ne valoras al la ordinara brita laboristo la rajto voĉdoni, publike kunveni, organiziĝi sindikate kaj striki, ĉar li neniam aŭdis pri la peno necesa, antaŭ ol li povis tiel agi.

Ceremonioj kaj Venenita Atmosfero

Antaŭ la milito aparta asocio klopodis enkonduki la ŝovinistan festenon "Imperia Tago", la 24-an de Majo, en la lernejon. La milito kaj ĝia postrestaĵoj fortigis tiun tendencon. Parolado de politikistoj pri la "granda Imperio, sur kiu la suno neniam malsupreniĝas", patriotaj teatraĵoj, ludoj kaj procesioj, gramofonaj diskoj enhavantaj specialan alvokon de la reĝo, uniformoj, disdono de medaloj, gaje koloritaj standardoj kaj flagoj troviĝas en la ceremonio. La instruisto aŭ studento, kiu ne ĉeestas, ofte estas punata. Kelkaj gepatroj spite de tio rifuzas lasi siajn geinfanojn partopreni en la trompaj aferoj. Sed multe dependas de la estro kaj la loka Edukada Komitato. Ĝis nun la Imperia Tago ne estas deviga.

Mi citu tie ĉi planon por infanludo, kiu aperis en "The Teacher's World" (14. 4. 1926) kaj disvendiĝis je 50 000 ekz.:

Nia Imperio: Teatraĵo por Imperia Tago

(Ne forgesu, ke la ĵurnalo, en kiu tiu ĉi plano aperis, estas la plej legata ĵurnalo inter edukistoj britaj kaj ke la patroj de la infanoj, kiuj prezentas tiun teatraĵeton samtempe suferis pro severa atako kontraŭ salajro.)

En la teatraĵo aperas reprezentanto el ĉiu parto de la Brita Imperio. Antaŭe la brita knabo kaj knabino apatias pri tiu afero, sed ĉe fino ili varme interesiĝas pri "nia Imperio". Malfronte de la scenejo feoj ruĝigas la ĝustan parton de la mapo, kiam aperas unu post la alia la vizitantoj. Ĉiu kantas pri la belaĵoj de Aŭstralio, de Novzelando, de Kanado, de Afriko, de Hindio ktp. Ili donacas filikojn, florojn, oranĝojn, bananojn, fiŝon, rizon kaj aliajn havindaĵojn. Fine ili deklaras unuvoĉe "Jes, la Imperio apartenas al ni ĉiuj" kaj kun manoj interplektitaj deklamas kune:

Shall not we, trough good and ill, Cleave to one another still. Britain's myriad voices call: "Sons be welded, each and all, Into one Imperial whole: One with Britain, heart and soul, One life, one flag, one fleet, one throne".	Ĉu ni ne dum bono kaj malbono Algluiĝos ankoraŭ unu al alia. Multegaj britaj voĉoj vokas: "Filoj, estu kunforĝitaj ĉiu kaj ĉiuj, Unu kun Britio, kore kaj anime, Unu vivo, unu standardo, unu militŝiparo, unu krono."

Poste laŭte kaj ĥore ili kantas la nacian himnon "La Reĝon Savu Di'!"

Portretoj de la gereĝoj, de famaj generaloj kaj de batalscenoj kaj la "Union Jack" (nacia standardo de Britio) ŝajnas esti en la kutima ekipo de preskaŭ ĉiu lernejo. La samaj temoj monopolas la bildojn en la ordinara lernolibro. Ofte nuntempe gravuriĝis sur speciala tabulo la nomoj de la lernejanoj, kiuj mortis en milito "por reĝo kaj patrio". Jen la ideala morto por la vivantoj!

Ĝis nun la Ministro de Edukado ne favoras la enkondukon de soldatdresado en la ordinaran lernejon kaj subtenas anstataŭe la korpekzercadon. Sed en la Universitatoj kaj en la "public schools" (lernejoj ĉefe nun por infanoj de riĉuloj kaj mezklasanoj kaj ŝtelitaj plejparte de malnovaj fondaĵoj por malriĉaj studentoj) la Ministro de Milito finance subtenas Cadet Corps kaj Officer's Training Corps, kiuj preparas la oficirojn por la armeo. Kelkfoje tiu ĉi enkadriĝas en la armeo mem aŭ apartenas al la loka Territorial Association (volantula parttempa soldata asocio). La estro de tiaj lernejoj ĉiam preferas instruiston, kiu promesis partopreni en tiaj aferoj.

Duonmilitaj asocioj, ofte kunigataj al lernejo kaj ĝia estro, estas Boy Scouts (Knabaj Skoltoj) kaj Girl Guides (Knabinaj Gvidistinoj). Teorie ili estas nemilitaj, sed en aliaj ceremonioj ili multe salutas la nacian standardon, paradas al preĝejo sub gvido de ekssoldatoj kaj preĝistoj. La anoj aŭdis multe pri la virto de obeo, disciplino, patrioteco kaj lojaleco al regantoj. Kelkaj el la skoltgrupoj eĉ lernas uzi pafilon. Ofte la instruista kandidato devas promesi funkcii en tiaj grupoj antaŭ ol li dungiĝas.

Ekster la lernejoj estas multaj patriotaj asocioj (ekz. la British Legion, ekssoldatoj), kiu penas influi la lernejon en la celebroj de l' imperiismo kaj ankaŭ atakas iun instruiston, kiu rifuzas helpi ilin.

Kion fari?

La oficialaj sindikatoj de la instruistoj en Britio estas plejparte reakciaj, sed ili subtenas ĉiun instruiston punitan per maldungo pro iu kaŭzo krom teknika aŭ morala nekompetenteco. Post la Ĝenerala Striko ekzemple, ili protestis kontraŭ la maldungo de la komunistino Marjorie Pollitt. Sed la persekuto funkcias ĝenerale en pli efektiva silenta maniero. La ordinara instruisto bone pagita, rilate al aliaj laboristoj, timas perdi oficon kaj ŝancojn de promocio. Oni ne povas aserti, ke persekuto ne okazas, ĉar malmultaj instruistoj estis eksoficigitaj pro politikaj aŭ kontraŭmilitaj opinioj.

Ni penas:

(a) Enmeti sur Edukataj Aŭtoritatoj laboristajn reprezentantojn, kiuj tute komprenas la danĝerecon de la ŝovinismo kaj kiuj protektos la instruiston, kiu diros la veron pri miltio, monarkio kaj la mastroj.

(b) Organizi bojkoton kontraŭ la ceremonioj pridiritaj supre.


(c) Ŝanĝi la ĉirkaŭaĵon de la infanoj en la lernejo kaj forigi la falsajn kaj malbonajn lernolibrojn.

(d) Enkonduki la lernolibrojn, kiuj enhavas la veron pri socia evoluo kaj preparas la infanojn kunelabori en socio bazita ne plu sur ekspluato kontraŭ la laboristaro.

Grava Postskribo al mia antaŭa artikolo

Ŝajnas ke mi "kalkulis la idojn antaŭ la elkoviĝo" en la afero de la laborista universitato brita. (Vidu n-on 12 (36) de "SR".) Ĉar la Estraro (General Council) de la Sindikataro (TVC) ne sufiĉe klarigis sian planon rilate al la afero, kaj ne sufiĉe konstatis la gravecon de la lokaj kursoj, kaj plue pro manko de mono en la sindikataj kasoj, la lasta Kongreso ĉe Bournemouth rifuzis akcepti la planon pagi po unu penco por ĉiu sindikatano. Nobelino Warwick ofendita reprenis sian donacon. Poste certe stariĝos alia plano.

M. S.



Nova tarifo de jarabono al "Sennacieca Revuo"

valida de oktobro 1926

(La unuaj nombroj, kiuj jus sekvas la landnomon montras la abonprezon por membroj de SAT, — la nombroj inter krampoj la abonprezon por nemembroj.)

Argentino 2 pes. (2,50); Aŭstrio 4 ŝil. (5); Belgio 13 fr. b. (15); Brazilio 4 milr. (5); Britio 3 ŝil. (4); Bulgario 80 lev. (100); Ĉekoslovakio 20 kr. (25); Danio 2,50 kr. (3); Estonio 250 mk. (300); Finnlando 25 mk. (30); Francio 13 fr. fr. (15); Germanio 2,50 mk. (3); Hispanio 4 pes. (5); Hungario 40 000 kr. (50 000); Italio 15 lir. (20); Japanio 1,50 jen (2); Jugoslavio 40 din. (45); Latvio 3 lat. (3,50); Litovio 6 lid. (7); Nederlando 1,50 guld. (2); Norvegio 3 kr. (4); Polio 3 zl. (4); Portugalio 12 esk. (15); Rumanio 120 lej (150); Sovet-Unio 1,25 rub. (1,50); Svedio 2,50 kr. (3); Svisio 3,50 fr. sv. (4); Usono 1 dol. (1,25)

Ankaŭ duon- kaj kvaron-jare abonebla.
Poekzemplera prezo: 0,30 mk. g.



Mendu provekzempleron ĉe Administracio de SAT
Richard Lerchner, Colmstrasse 1, Leipzig O 27, Germanio

Pagu prefere per ŝtataj monbiletoj en registrita letero.

La germanianoj pagu al poŝtĉeka konto de la Administr. n-o 6835.
La abono validas nur post pago kaj komenciĝas kun ĉiu jarkvarono.

Presejo: Uns-Produktivgenossenschaft, Leipzig (Germanio)